# Ĉirkaŭ *Pola Radio*

## 3. SPECIMENAJ ELTIRAĴOJ

## 3.7.4. Malavara junulo (kvara parto)

(Ekzerco por aŭskulta kompreno)

El la kolekto *Kubaj popolaj fabeloj* de Marin Bacev,
elsendita je 2004/02/07, legas Barbara Pietrzak.

Taskoj:

***1) Bonvolu aŭskulti la sonmaterialon, elŝuteblan je la sekvaj adresoj:***

a) en formato MP3: http://perso.wanadoo.fr/kursoj/edukado.net/eroj/ed_pr13d.mp3 aŭ
b) en formato RealAudio: http://perso.wanadoo.fr/kursoj/edukado.net/eroj/ed_pr13d.rm

En la komenco estas mallonga rememorigo pri la antaŭaj epizodoj.

***2) Bonvolu rigardi la subajn demandojn kaj poste denove aŭskulti la elsendaĵojn. Post tio provu respondi al la demandoj***:

1. En kio konsistas la lasta ruzaĵo de la maljuna servisto?
2. Kio estis perdita? De kiu? En kiuj cirkonstancoj? Antaŭ kiom da tempo?
3. Kiu ĉi-foje helpis lin?
4. Kiu nun posedas la ringon? Ĉu ĝi redonas la ringon?
5. Kiel la junulo sin venĝas kontraŭ la maljunulo?
6. Kio do okazis al la maljunulo?
7. Kio okazis al la junulo?

**Demandoj pri la teksto (pripensado)**

8. Kiel vi pritaksas la venĝon de la junulo?
9. En kio konsistas la morala instruo de la fabelo (pensu pri la malavareco de la junulo al la bestoj, ilia reciprokado, lia bonkoreco kaj posta venĝo, la malbonkoreco de la maljunulo, la necesa fido antaŭ neplenumebla tasko, la arbitreco de la reĝa povo…)?
10. Klarigu, kiamaniere la sekvaj proverboj povas aplikiĝi al la eventoj en ĉi tiu fabelo, aŭ tute ne aplikiĝas: *servo postulas reservon / malsaĝulon favoras feliĉo / post domaĝo venas saĝo / barakti kiel fiŝo ekster la akvo / fiŝo pli granda malgrandan glutas / kolero montras malsaĝulon / sata malsatan ne povas kompreni*… Trovu aliajn.

**Daŭrigota.** Serĉu la sekvan parton!
Ni esperas, ke vi **ne bezonas** la solvojn! Se tamen, petu ilin ĉe redaktanto@edukado.net kaj ni sendos ilin.